

trimestriel
2^{ème} trimestre
2012


LA INFORMILO

N° 158
30 juin
2012

l'espéranto



la langue de l'amitié
sans frontières



esperanto



la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR - 54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

annuel / jara

15 €

eksterlando

18 €

esperanto
France-Est

Madame Sûzel PAILHES
est l'auteur d'un bel album qui
présente la Cathédrale de
Strasbourg sous forme de jeu.

L'ouvrage paraîtra en neuf
langues.

Après les premiers volumes
en français, allemand et an-
glais, est parue la série en espagnol, russe et **ESPERANTO** (traduction en espéranto de Monsieur André GROSSMANN).

A paraître la troisième version en italien, néerlandais et japonais (traduction en japonais de Madame Masako GROSSMANN). Ces ouvrages sont en vente dans la boutique de la cathédrale et auprès de notre libroservo.

Un grand merci à Madame PAILHES, fille de Monsieur Joseph KRÄMER, qui fut, pendant de longues années, un des plus fidèles membres de notre association régionale d'espéranto.

Rappelons que grâce à Monsieur Cyrille HURSTEL du groupe de Strasbourg, les touristes espérantophones peuvent écouter les commentaires sur les bateaux-promenade de Strasbourg en espéranto.

Une visite virtuelle multilingue et originale pour un chef-d'œuvre architectural !

" *Prodige du gigantesque et du délicat* " (Victor HUGO)

**Pequeñas Historias
De la Catedral de Estrasburgo**

libro de descubrimiento de 3 a 99 años

**Короткие рассказы
о Страсбургском соборе**

Познавательная книга от 3 до 99 лет

**Etaj rakontoj
pri la
katedralo de Strasburgo**

Infantiliga libro
de 3- jaraĝo ĝis 99-jaraĝo

Texte : Suzel PAILHES
Illustration : J.F. MATTAUER dit GIEFEM

Espéranto France-Est	esperanto France-Est	Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC	
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines
		avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06.98.09.62.81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Asesores	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK	06.34.33.68.93	mirantur@hotmail.com
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.16.63	bertrand.wick@wanadoo.fr
	S-ro Alian Collignon	03.83.40.35.60	colli.alano54@orange.fr

Abono al La Informilo →	Francio: 15 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

SOMMAIRE	ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Esperanto France-Est MJC PhiJippe Desforges – 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur : PoI DENIS Dépôt légal : 30 juin 2012 <i>Imprimé par l'imprimerie de l'encre</i> 55000 Hargeville-sur-Chée
1 page frontale 2 ours 3 angulo de la prezidanto 4 raporto <i>Petite Pierre</i> 5 Nancy <i>majo de Eŭrop</i> pri eŭropa himno 6 raporto nacia kongreso 7 " 8 aŭtuna renkontiĝo 9 aliĝilo 10 KER-ekzameno Frankenthal 11 Sarreguemines 12 raporto Saulxures " Nilvange	13 Luarkasteloj Greziljono 14 l'anglais dans le cokpit 15 raporto Albanio 16 " 17 japana pentristo 18 - monaĝo 19 Edmond Privat 20 libroservo 21 " 22 ni provu rideti 23 distra angulo 24 el nia fototeko

Karaj gesamideanoj !



Vi certe scias, ke iĝas danĝere promenadi tra la arbaro aŭ labori en ĝardeno, ĉar de kelkaj dekoj da jaroj, *iksodoj*, kiuj suĉas vian sangon, ankaŭ transdonas la *Malsanon de Lyme*, kiu kapablas handika pigi vin ege serioze. Pluraj konatoj miaj suferas pro ĝi, du el ili eĉ ne plu kapablas marŝi.

La amaskomunikiloj certe nun avertas la homojn, kaj konsilas, ke oni sin observu post promenado en la naturo, kaj tuj prenu duŝon kaj ne lasu la besteton sin fiksi en la korpaj molaĵoj ! Se jam tro malfruas, ili konsilas aĉeti en apoteko iun plaston ileton, per kiu eblas ĝin eltiri, sed necesas agi singarde, ĉar se oni deŝiras la korpon sen eligi la kapon, la infekto povas daŭri.


Eble jam de kelkaj linioj vi vin demandas, kial mi skribas pri *iksodoj* !!! Nu, aŭskultu la sekvon : de longege la kamparanoj sciis, ke por forigi iksodon de la korpo, sufiĉas meti iom da oleo aŭ da butero sur fingron, karesi delikate per turnaj movoj la iksodon, ĝis ĝi iom post iom sufokas kaj malkroĉiĝas !

Kaj nun la demando : ĉu iam ajn vi aŭdis pri tiu absolute senkosta metodo ??? ...

Sciu, ke ekzistas milionoj da homoj, al kiuj oni rifuzas informon pri efikega internacia komunikilo, kiun vi konas de longe !

Edmond LUDWIG

Plej esperantiste !



pour vous initier à la seule
vraie langue internationale

pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto !...

pour profiter de
nos stages, de nos rencontres,
de nos congrès, de nos voyages ...

" *** ?... "

- *** ! "



esperanto
France-Est



la solution ...
un cours personnalisé
chez soi !

rapidité...
efficacité...
deux maître-mots
de notre cours
par correspondance !

- * un matériel adapté
- * une technique éprouvée
- * un réseau d'animateurs performants
- * un savoir immédiatement opérationnel



Edmond LUDWIG
26, route de la Schlucht
68140 STOSSWIHR

une diffusion
sur toute la région
et au-delà !

information : 03 89 77 52 55

à consulter !

Nous mettons à votre disposition le site internet de notre association *Espéranto France-Est*

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

également accessible par

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vous serez informé non seulement sur l'histoire et sur la vie actuelle de notre association, mais encore sur les activités des groupes locaux, sur les initiatives des espérantophones isolés ...

et sur l'Espéranto en général ! Egalement à votre disposition la liste exhaustive de notre « libro-servo » !

Plusieurs liens vous permettront de découvrir d'autres sites originaux en France et dans le monde.

Notre rubrique "*albums photos*", complétée en permanence, vous offrira un panorama exhaustif original des événements régionaux et ... extérieurs !

une visite s'impose !

...denove sukcesa renkontiĝo internacia !...

« Printempa Staĝo » en *La Petite Pierre* (Nordaj Vogezoj)
23-24-25 ajn de marto 2012

Estus banale diri, ke la staĝo estis tre interesa kaj bonetosa, ĉar ĉiuj staĝoj de *ESPERANTO France-Est* estas ĝenerale tiaj, ... ke la suno brilis en bela printempa naturo: ho jes, ni denove bonŝancis... ke la vilaĝo estis belega, la gastejo komforta kaj la manĝo tre bona: tio ne estas esceptaj faktoj dum niaj aranĝoj.



Kelkaj ge-agemuloj « pozas »

Mi tamen volas substreki kelkajn faktojn, kiuj estis aparte menciindaj.

Unue, ni estis 50, kaj la ĉeestantaro estis maksimume internacia ... 11 germanoj, 1 italo, 1 polo, 1 nederlando kaj 36 francoj.

La 14 ne-francoj faris la "krokodiladon" praktike neebla, kaj esperanto venis tute nature.

Due, la nombro de homoj junaj estis aparte favora, ĉar la germanoj venis kun junaj membroj, kaj la grupo de Strasburgo, kiu ĉifoje povis veni pro favora dato, estis aparte juna kaj dinamika.

Alia ne-kutima fakto estas, ke la ĉefa distra vespero kun nia ĉarm-kantisto *Manuel ROVERE* okazis en la vilaĝo, kune

kun loka aranĝo de poezia rondo. Oni aŭdis ne nur esperanton, sed ankaŭ francan kaj alzacan lingvon.

La ne-esperantistoj diris al mi, ke ili komprenis nenion el la kantoj de Manuel, sed ke lia voĉo estis ege plaĉa. Ankaŭ *Robert KUENY* aldonis al la poezia rondo deklamon de kelkaj poemoj en esperanto.

La personoj, kiuj venis vendrede povis ĝui plurajn turismajn vizitojn; vendrede matene, piedpromenado en la vilaĝo kun vizito al remparoj, sed ankaŭ al muzeo de muldiloj por anizaj biskvitoj, kaj al muzeo de sigeloj. Dimanĉe la muzeo *Lalique*, en la proksima vilaĝo *Wingen-sur-Moder*, malkovrigis al ni mirindajn parfumo-ujetojn.

Pri la prelegoj kaj kursoj: mi ne ĉeestis la prelegon de *Tomasz CHMIELIK*, ĉar mi mem zorgis pri grupeto de komencantoj. Laŭdire,

Tomasz parolis en klara bone komprenebla esperanto kaj estis interesa. Temis pri libroj kaj pri diversaj aferoj, en kiuj li laboris kaj verkis. La junulo *Fabien TSHUDY* faris interesan kurson, helpata de bildoj sur ekrano. Laŭ mi, kiu parte ĉeestis lian kurson, la kurso estis instrua, paroliga, kaj ĉefe Fabien enmetis gramatikolecionojn en la taŭgaj momentoj, kiam la utilo okazis.

Pri mi mem kaj pri mia kurseto por komencantoj valoras rakonti... Mi unue komencis kun "3 kaj duono" lernantoj. Kial "duono" ?... ĉar la edzo de virino volis nur ĉeesti sen lerni ! Post duono de horo, unu el miaj lernanto esprimis deziron iri en la vilaĝon por aĉeti benzino; mi ne plu revidis lin. Restis 2 lernantoj kaj duono. Kiam venis la fino de la sabata kurso, mi povas diri, ke restis al mi 3 lernantoj, ĉar la akompana edzo sukcesis iom interesiĝi kaj enkapigi al si kelkajn elementojn.

Dimanĉe, la paro ne revenis (eble ili estis lacaj), restis nur mia plej bona lernantino. Post iom da spionado de la apuda kurso de Fabien, mi opiniis, ke mia lernantino povos tiri profiton el lia kurso, sed mi unue decidis, ke ni ne devas veni ĉe la kurso de Fabien kun malplenaj manoj, kaj ke ni povas prepari surprizon.

Kun *Imtraud*, kiu bone scipovas ludi gitaron kaj havis provizon de esperantaj kantoj sur paperoj, ni iris ekzercadi sur benko en la suno. Kiam mi vidis, ke ni kune kantas sufiĉe bone por ne ricevi mokojn, ni iris al la kurso de Fabien, ĝuis ĝin, kaj je la 12a, iom antaŭ la tagmanĝo, ni proponis nian koncerton. Ve, ĉiuj eskapis por iri al necesejo. Mi estis iom konfuzita, sed iom post



La « velura » voĉo de Manuel ravis la aŭskultantojn !

iom, ĉiuj revenis kaj ni faris bonan improvizitan koruson, en kiu amaseto gaje kantis.

Ĉiam plaĉas al mi la ne-planitaj aferoj, ekzemple kiam, dum vizito al la vilaĝo, la eks-korusanoj de *Interkant'* kuniĝis por kanti la "Kanton Ĝeneralan" de *Pablo Neruda*, kiu tiel agrable sonis en tiu bela printempa naturo.

Ne mankis la libro-servo zorgita de *Jean-Luc* kaj *Micheline*, kaj samsalone la ekspozicio de floroj de *Paŭl Linus*.

Mi kredas, ke ĉiuj rehejmiĝis tre kontentaj. *Bertrand Wick* bone prganizis la tutan aferon.



Postmanĝa ĝoja interbabilado !

"esperanto 54" sur la eŭropa podio !



Jam de 10 jaroj, dum la tuta monato majo, la urbo Nancy (Francio) celebras Eŭropon kun multaj, diversaj manifestacioj, starigitaj de lokaj institucioj kaj asocioj.

El la ampleksa programo ni citu la « eŭropan vilaĝon », kiu logis la vizitantojn en la vasta komerc-centro « St-Sebastien ».

Denove enpartoprenis la eventon la loka klubo « Esperanto 54 », kun propra stando, instalita frue ĵaŭdon la 3an de majo, dank'al la daŭre agema klubanino Micheline Colnot.

Kadre de la inaŭguro, je la 15a, la urbestro André Rossinot, kun delegacio de « internaciaj rilatoj », haltis por saluti la deĵorantojn. Esperanton li ja malkovris antaŭ kelkaj jardekoj kaj menciis sian subtenon al tiu bela projekto.

Post la kutimaj paroladoj, ĉiuj responsuloj de la standoj estis invititaj trinki la « glason de l'amikeco ».

Dum babiladoj estis elvokitaj proponoj por prezenti esperanton en diversaj eksteraj lokoj, interalie ĉe la *universitato de la daŭra kulturo*, en klasoj de studentoj preparantaj eniron en fakuniversitatojn, ktp !

laŭ raporto de Gisèle Bertapelle



foto - alportis sian helpon Yoann, studento en Nancy. Freŝbakita esperantisto li lernis la lingvon per la reto. La Eo-flageto de lia horizontala biciklo ne mankas vekti intereson survoje !

... pri "Eŭropa himno"...



En sia inform-ĵurnalo de la 12a de majo, ARTE, franc-germana televid-ĉeno, publikigis en sia elsendo titolita "civitanoj parolas" intervjuon de Seán Ó RIAIN, irlanda diplomato kaj esperantisto, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), kiu strebas por ke la Eo-himno iĝu tiu de Eŭropa Unio. Li eĉ surprizis la telespektantojn, *kantante li mem la aluditan himnon !...*

Sed la koncernata fak-komisiono oficiale rifuzis la proponon !

Laŭ ĝia motivigo, tiu propono kolekti subskribojn subtene al himno en Esperanto ne estas akceptebla, ĉar *neniu EU-lando agnoskas Esperanton kiel parton de sia kultura heredaĵo.*

La celo de la iniciato laŭ EEU estis fortigi la komunan, eŭropan identecon, grandigi la partoprenon de la civitanoj en la eŭropa integriĝo,

donante al ili la eblon kanti kune, kaj certigi la respekton por ĉiuj eŭropaj lingvoj.

Zlatko Tišljar, sekretario de EEU, atentigas ke ekzistas multaj lingvoj en Eŭropo, kiuj sendube kontribuas al la eŭropa kultura heredaĵo, sendepende de tio, ĉu ili estas oficiale agnoskitaj... Ni menciuj la romanan, la rusan, la turkan, araban, ĉinan kaj multajn aliajn lingvojn, en kiuj kulture kreadas milionoj da eŭropaj civitanoj.

Al tiuj sendube apartenas ankaŭ Esperanto, kiu apartenas al 30 lingvoj kun la plej riĉa *wikipedia* materialo en la mondo, al 64 lingvoj de *google-tradukiloj*, kaj kiu havas riĉan, originalan kaj tradukliteraturon kun pli ol 100 00 libroj.

Zlatko Tišljar supozas, ke la Eŭropa Komisiono timas sukceson nomkolektan kampanjon, kiu laŭ li povus "startigi tuteŭropan debaton pri la demando de efika kaj justa komunikado en EU".

Tuj kiam la informo pri la rifuzo de la Eŭropa Komisiono atingis *Liberan Folion*, la ĵurnalo sin turnis al EEU por havi pliajn informojn. Ĝi ricevis respondon de Seán Ó Riain, Laŭ lia opinio, la Eŭropa Komisiono malĝuste interpretas siajn proprajn regulojn, argumentante ke la propono de EEU ne estas akceptebla, ĉar neniu membroŝtato de Eŭropa Unio esprimis sian subtenon al Esperanto... "La Komisiono rezonas kvazaŭ la celo de la propono estus antaŭenigi Esperanton. Tamen la celo estas antaŭenigi la himnon, kaj Esperanto estas la rimedo. Eble la sola rimedo kantigi la himnon, respektante la malsamajn kulturajn heredaĵojn de la membroŝtatoj. Do, se iu membroŝtato efektive subtenus Esperanton kiel parton de sia kultura heredaĵo, aliaj povus opinii, ke Esperanto ne plu taŭgas kiel neŭtrala himna lingvo".

Aldone, Seán Ó Riain atentigas, ke laŭ la baza traktato pri la funkciado de Eŭropa Unio, EU ne nur kontribuu al la disvolviĝo de la kulturo de la membroŝtatoj, sed ankaŭ "reliefigu ilian komunan kulturajn heredaĵojn"... Esperanto estas ĝuste komuna kultura heredaĵo, ne nacia.

"La estraro de Eŭropa Esperanto-Unio ankoraŭ ne decidis, kiel ĝi pluiros post la rifuzo, diras Seán Ó Riain, EEU nun konsideras multajn eblajn reagojn, kaj evitos iun ajn hastan decidon. Ni restos prudentaj".

Franca Esperanto-Kongreso en Saint-Aignan de Grand Lieu 25-29ajn de majo 2012

Ĉi-jare *Esperanto-France* proponis sian nacian kongreson en la proksimeco de la urbo Nantes, en la urbeto *Saint-Aignan de Grand Lieu* en ĉarma kastelo La Plinguetière.

Apud la kastelo troviĝas konstruaĵoj kun taŭgaj salonoj, por la prelegoj, la libro-servo, kaj trinkejoj; ĉaledoj kun bone ekipitaj ĉambroj. Krome la parko de la kastelo povis esti agrable uzata por iuj programeroj. Tie estis starigitaj kelkaj tendoj por la akcepto, la interkona vespero, la aperitivo. La vetero estis ege favora. Tio alportis al la unua vespero tre simpatian etoson. Pli poste la partoprenantoj estis invititaj viziti la movadan foiron, kie sin prezentis diversaj asocioj kiel *Gresijono*, *Kvinpetalo*, *OSIEK*, *GEE*, Morgaŭ la printempo ktp.



Sabate okazis la laborkunvenoj de la komitato de Esperanto-France. Grava konstato montras la malkreskon de membroj al la nacia asocio kaj de abonantoj al **Le Monde de l'Esperanto**. Ekestis diversaj proponoj por faciligi la membriĝon.

Ekzemple

- Kreado de **interasocia kotizo** kiu ebligas malaltepreze aliĝi al **Espéranto-France**, kondiĉe ke la tuta asocio samtempe aliĝas kaj profiti impost-atestilon. La loka klubo de Béziers eksperimentos tion venontjare.
- Dediĉo de la **Klubo 2000-kaso** por eldono de nova lernolibro, kiu sekvas modernan pedagogion kaj eŭropan sistemon.

Kaj la estraro informis la membrojn pri :

- la kandidato de la urbo Lille por **UK 2015**
- la baldaŭa eldono de nova albumo de Tinĉjo "*La templo de l'suno*"
- la nova retejo pri regionaj federacioj,, kaj tiu de lokaj kluboj atingebla de la retejo de Esperanto-France

Okaze de la komitatkunsido, la nova estraro estis elektita :


- Axel ROUSSEAU - Prezidanto
- Julia HÉDOUX - Vicprezidantino pri kongreso
- Philippe DEBRIX - Vicprezidanto pri eksteraj rilatoj
- Sébastien MONTAGNE - Kasisto
- Anne-Émilie RAVACHE - Vickasistino
- Karine TEXIER - Sekretariino
- Véronique BICHON - Vicsekretariino
- Didier JANOT - Estrarano pri agadplano



année	membres	abonnés LME
2007	690	538
2008	658	512
2009	657	483
2010	637	453
2011	594	412
(nun	522	360)



Axel ROUSSEAU -
Prezidanto



Roman Dobrzyński, Brian Moon kaj juna brazilano el *Bona Espero*

Roman Dobrzyński estis invita al la kongreso. Li estas konata kiel reĝisoro. Li realigis plurajn filmojn en Esperanto

Aparte grava estas lia filmo farita por Pola Televido okaze de la centjara jubileo de Esperanto. Lia filmo *Japana Printempo - Oomoto 2009* gajnis la unuan premion en la Belarta Konkurso de UEA 2011. Unu el liaj furor-libroj estas *Bona Espero* - idealo kaj realo pri la fama esperantista edukejo en Brazilo, kaj pri tio li realigis plurajn filmojn. Li prezentis la plej lastatempnan, *Ora Bona Espero*. Ankaŭ lastatempaj estas la filmoj *Aroma Jalto* kaj *Zamenhofa kuracejo*.



Okaze de la sabata distra vespero Gijom prezentis en la franca preleg-koncerton, en kiu li emfazis la logikon vivi ekologie kaj uzi Esperanton. Li pianludis kaj kantis en Esperanto.

Dimanĉe li koncertis en Esperanto, en la parko de la kastelo.

Pluraj ekskursoj estis proponitaj dum tiuj tagoj. Plej unue viziton al la muzeo Jules Verne en Nantes. En Nantes troviĝis gravaj ŝip-konstruejoj. Nuntempe tiuj lokoj estas uzataj kiel amuzejoj, kun mirigaj mekanikaj maŝinoj, kiel la mekanika elefanto. Iom laŭ la fantaziaj rakontoj de Jules Verne.

En proksimeco de Saint-Aignan de Grand Lieu troviĝas la plej granda natura lago en Francio: *La lago de Gand Lieu*.

Alia ekskurso estis proponita al Pornic ĉe la marbordo.




Pornic

En la lasta tago okazis la tut-taga ekskurso al Nantes ĉe la elfluejo de la riverego Loire.

Tie ni prame transiris la riveron kaj trovis ĉe la alia flanko bele ornamitajn ĝardenojn, parkojn.

Aparte interesa estis la vizito al amuzejo kun la impona mekanika elefanto, kiu povas transporti plurajn homojn sur du niveloj. Sed eble estis eĉ pli interese rigardi ĝin paŝadi malrapide tra la korto.

En la posttagmezo turisma trajneto ebligis viziti la urbon kaj konatiĝi kun multaj kulturaĵoj.



Raporto kaj fotoj: Andreo kaj ties komputilo



Supre: Muzeo de Jules Verne

34a BAVELO-Seminario	72a regiona esperanto
Junulargastejo Kastelo Ortenberg Burgweg 21	staĝo de <i>France-Est</i>
77799 Ortenberg Tel: +49.781.31749 Fakso: +49.781.9481031	Okazos en Ortenberg en Germanio de 21a ĝis 23a de Septembro 2012

Esperanto - lingvo kaj pli 21 - 23 Septembro 2012 Kastelo Ortenberg



Lerni Esperanton estas plezuro. Precipe se tio okazas en la gaja rondo de internacia lern-semajnfino. Nia seminario, ĉi-foje en la jaro de la 125-jara ekzistado de Esperanto, ofertas buntan programon kun diversaj elstaraj programeroj:


Tute novan korpo-senton peras veturado per "starveturilo" - sole per kliniĝo antaŭen/malantaŭen oni stiras du-radan veturilon, akcelas kaj bremsas same nur per ŝanĝo de la pezo-centro. Ekscitiga sperto kaj vera defio.

Same interesa estas la ŝipveturado ĉirkaŭ la urbocentro de Strasburgo. Kiel lingvo de la sonsistemo sur la ŝipo elekteblas ankaŭ Esperanto en kanalo 10.

Aldone al niaj "klasikaj" kursoj por komencantoj kaj komencintoj ni ofertas paroligan kurson kaj multfacetan bukedan kurson. Krome allogas instiga vespera programo, i.a. kun prezentado de *Georgo Handzlik* en la rolo de Ludoviko Lazaro Zamenhof.



Ortenberg: Loko de la BAVELO-Seminario 2012



La komunumo *Ortenberg* troviĝas *proksime de Offenburg*, ĉe la piedo de la Nigra Arbaro. Ortenberg estas vilaĝo de vinkultivado, situanta ĉe la Badena Vinstrato. Elstara vidindaĵo estas la *Kastelo Ortenberg*, starigita meze de la 19-a jarcento sur la ruinoj de la malnova burgo, kiu originas en la 11-a/12-a jarcento. Nuntempe la kastelo estas uzata kiel junulargastejo.

Ĉi-jare ĝi ankaŭ estas la ejo de nia BAVELO-Seminario:



Junulargastejo Kastelo Ortenberg (vidu pli malsupre Alvojaĝo)

Burgweg 21

77799 Ortenberg

Tel: +49.781.31749

Fakso: +49.781.9481031

Tranoktado

Se vi preferas ne loĝi en la junulargastejo, bonvolu mem mendi vian ĉambron. Proksima hotelo estas =>

Edys Hotel-Restaurant im Glattfelder

Kinzigtalstraße 20

77799 Ortenberg

Tel: +49.781.9349-0

Fakso: +49.781.9349-29

info@edys-restaurant-hotel.de

Alvojaĝo per trajno: Veturu ĝis la stacidomo de Offenburg, post per buso 7134 aŭ 7160 ĝis Ortenberg, haltejo Schloss/Freudental (daŭro ĉ. 10 min). De tie sekvu la ĉefstraton direkte al Gengenbach ĝis la gastejo Krone, poste iru maldekstren laŭ strato Burgweg ĝis la junulargastejo (ĉ. 500 m).

Alvojaĝo per aŭto: Sur aŭtoŝoseo A5 (Frankfurto-Bazelo) ĝis elirejo Offenburg, poste daŭrigu sur strato B33 direkte al Villingen-Schwenningen. Post Offenburg sekvu la elirejon Ortenberg-Elgersweier. En Ortenberg veturu ĉiam rekte ĝis trans la malgranda trafikcirklo (mallarĝa strato maldekstre de la gastejo Krone) kaj sekvu la straton Burgweg ĝis la kastelo.

Provizora Programo de la BAVELO-Seminario 2012

Kursoj

- A - Kurso por komencantoj 1
- B - Kurso por komencantoj 2
- C - *Paroliga Kurso* - Konversacio/diskutado pri interesaj temoj
- D - *Bukeda Kurso* por progresintoj kaj spertaj parolantoj, celataj temoj:
 - ◆ La jubilea jaro kaj ni - diskutrondo
 - ◆ Esperanto-historio en Alzaco
 - ◆ Kiel funkcias la star-veturilo
 - ◆ Stuttgart 21
 - ◆ Bildoj kaj anekdotoj el 8 jaroj da *Blue floras la genciano*
 - ◆ Pecha Kucha - distra informtekniko
 - ◆ Filmo: *La universala lingvo*

Aliĝilon bonvolu sendi al:
S-ino Inge SIMON,
Brünner Str. 20
DE-73431AALEN
 Tel. 00.49-7361/ 360 615,
 Inge.Simon@esperanto.de

La aliĝo validas post alveno de mono:

- Pagebla per ĝiro al
 CCP Esperanto France-Est
 1997 72 W Nancy
 - per franca ĉeko al

Esperanto France-Est
 sendata al

André GROSSMANN
 5, rue des Pyrénées
 68390 BALDERSHEIM
 ret-adreso: andreo.ag08@free.fr

Turisma programo, i.a.

- ◆ Star-veturado tra Strasburgo
- ◆ Batorama-ŝipveturado tra Strasburgo, sonsistemo ŝaltebla al Esperanto

Vespera programo, i.a.

- ◆ Gvidata rondiro tra la kastelo
- ◆ Surpriziga sekvenco ...

Eblas aliĝi elektronike ĉe la retejo <http://esperanto-bw.de/seminario-eo> per la formularo aŭ ĉe Inge Simon (retpoŝte aŭ telefone: +49.7361.360.615).

La aliĝkotizo estas 30 € (resp. 15 € por gejunuloj ĝis 30-jaraj). Aldoniĝas laŭkaze la kostoj por tranoktado/manĝado en la junulargastejo respektive la Starveturado tra Strasburgo.

Kostoj por du tagoj inkluzive de manĝado en la junulargastejo, tranoktado en plurlita ĉambro: 67 €. Nur manĝado: 32 €.

Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Ortenberg

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo
1		
2		
3		
4		

Adreso

Telefono:

Ret-adreso:

Mi pagas la sumon..... al **Esperanto France-Est**

Mi / ni partoprenos la kurson kaj programon

- A** komencanto 1 **B** komencanto 2
 C Paroliga kurso **D** Bukeda kurso
 Starveturado (sabate posttagemeze, 70 €)
 Ŝipveturado en Strasburgo kun Esperanto-klarigoj

Tranoktado:

- Ne bezonata, mi mem zorgas pri tio
 vendrede/sabate en junulargastejo (plurlita ĉambro)
 sabate/dimanĉe en junulargastejo (plurlita ĉambro)

Manĝoj:

- mi ne kunmanĝos
 vendrede/sabate en junulargastejo
 sabate/dimanĉe en junulargastejo

Aliaj rimarkoj:

KER *** : rekorda tutmonda sesio !



380 kandidatoj el 29 urboj de 17 landoj aliĝis al la Tutmonda Skriba Ekzamen-sesio okazonta la 9an de junio 2012, danke al *Katalin Kováts*, kiu, en la nomo de la Ekzamen-komisiono de UEA, lanĉis kaj organizas ĝin tra la tuta mondo.

La ekzameno vekis la plej grandan intereson en Francio, kie en naŭ urboj entute 125 francaj kandidatoj ekzameniĝos, sed la plej multnombra kandidataro (42) kunvenos en la Meksika urbo *Tecamac* !

Menciindas ankaŭ la aktiva partopreno en Ruslando, kie en Moskvo kaj Jekaterinburgo entute 56 personoj enpartoprenos la eventon. Legu pli en la novaĵretejo *La Balta Ondo*:

<http://sezonoj.ru/2012/05/212ker>

La Roche. Les espérantistes planchent ce matin sur un examen



ouest
france .fr

Ils sont une poignée de lève-tôt à avoir pris ce matin leur voiture pour aller au lycée de Lattre pour passer un examen d'espéranto. Ils planchent sur une épreuve de connaissance grammaticale, une rédaction, une compréhension de textes. Il se passe la même chose dans 17 autres pays.

Le diplôme est reconnu officiellement par l'université de Budapest, car *Katalin Kowats*, Hongroise, est à l'origine de cet examen, où Japonais, Suédois, Brésiliens ou Yonnais vont donner le meilleur d'eux-mêmes.

Cultures 9 juin 2012

Informo por piedmigrantoj

Ekde kelkaj semajnoj, la retejo de la farmgastejo *FRANKENTHAL*, funde de la valo de *Munster*, estas legebla en *ESPERANTO*. La gastejo situas en mirinda naturpejzaĝo !

La familio *SCHUBNEL* prizorgas tiun gastejon meze

de la naturo. Esperanto tie ankoraŭ ne estas parolata, tiu retejo pri turisma estas simple la unua en la bela valo de *Munster* en Esperanto.

<http://frankenthal.pagesperso-orange.fr>



Lastane minuton: En Francio, la 9an de junio, 125 personoj trapasis la skriban parton de la de la KER-ekzameno

ESPERANTO IĜAS ATUTO ENLANDE :

Jen migras niaj gefiloj kaj genepoj ĉiufranken en la « heksagono » pro labordevigoj.

Ja nuntempas tia mobilizado, ĉar estas promesplena ebleco de laborokaptado.

Jen aperas ankaŭ devigo forlasi familian rondon.

Nu ! Estas feliĉiga okazo por gejunuloj pro ties emo provi siajn flugilojn.

Sed pli, malpli doloriga sento de gepatroj kaj geavoj fronte al tia disigo de karuloj.

Kaj eĉ peza maltrankviliĝo por tiuj lastaj.



Sed vidu ! Vi, Esperantistoj, havas ATUTON ne antaŭviditan !

Antaŭ mallonge spertulino pri agrikulturo kaj naturmedio el *Saint-Brieuc* trovis adekvatan laboron proksime de *Sarreguemines* (je 900 km da dispartigo !). Ĉar ŝiaj gepatroj klopodis instrui Esperanton al ŝi infanaĝe, la juna virino trovis amikecan etoson en la urba grupo. Do ! Kontentiga okazaĵo por la junulino, kiu povas kalkuli kun gastameco. Plue ! Kontentiga okazaĵo por la grupanoj kiuj aprecas ielan « novan venton ».

L'ESPRIT UNIVERSEL : quelques réflexions pour étoffer une « Lettre ouverte à M. le Ministre »

Dans les rangs ministériels on déclare :

L'ÉCOLE SERA NOTRE PRIORITÉ POUR LES CINQ ANS A VENIR ! (applaudissements nourris !)

« En dix ans, nos enfants ont perdu une année entière de scolarisation, en pertes de présence à l'école !

Le corps enseignant aura été amputé de dizaines de milliers d'intervenants, au détriment de la qualité de l'enseignement et des conditions de travail.

La formation adéquate des enseignants est à reprendre sans tarder.

La réhabilitation des ESSENTIELS est urgente : nul besoin de nouvelle réforme ! »

Notre question :

Quid du souci de la formation à la citoyenneté ? Du citoyen français, bien sûr ? Européen également ?

Nous avons (facilement) abandonné l'aspect purement éducatif dans l'école de la République. Et cela après 68 ! C'était le temps où « tout le monde, il était beau ! Tout le monde, il était gentil ! ».

L'éducation civique et son enseignement formel pe-saient aux « chargés de mission de la République ». L'Education nationale a failli ainsi à sa mission d'éducation à la citoyenneté et d'éveil à la responsabilité personnelle.

Alain, dans ses PROPOS SUR LA RELIGION, rappelle aux émancipés -que nous sommes devenus-le formidable essor d'humanité qui s'est imposé en Occident, depuis deux millénaires.

Alain écrit : « L'Eglise a réalisé le cathéchisme pour tous et la société internationale des esprits... »

Cette idée d' ESPRIT UNIVERSEL a trouvé son épanouissement avec les Lumières, elle s'est imposée avec l'école obligatoire, gratuite et laïque. Alain note : « le trésor ne s'est pas perdu ; il a changé de mains. »

Il convient de relancer cette idée !

Or, NOUS DISPOSONS d'un merveilleux document édité par l'UNESCO : Le Manifeste 2000.

Un texte qui pourrait devenir « la base d'une ÉTHIQUE HUMANISTE COMMUNE à tous les êtres vivants, égaux en droits et aussi EN DEVOIRS ».

Le Manifeste 2000 ? L'Éducation nationale l'a superbement ignoré, dès sa publication : elle entendait faire mieux, sans aucun doute.

(Rappel : Le Groupe des Enseignants Espéranto-phones avait participé à la promotion de ce texte.)

Monsieur le Ministre, encore :

« 140 000 jeunes quittent chaque année l'école, sans qualification » (et sans la moindre langue étrangère : une carence et une dévalorisation personnelle, à vie).

Pour le philosophe L.Wittgenstein : « Les frontières de (leur) monde sont les limites de (leurs) capacités linguistiques. »

Or NOUS DISPOSONS d'un merveilleux outil d'émancipation, qui éduque à l'Esprit Universel, qui fonctionne depuis cent ans, qui est ...

ACCESSIBLE AUX APPRENTIS : l'espéranto.

Nos apprentis subissent un manque choquant de formation linguistique...

... L'ESPERANTO serait pour eux un moyen de relèvement et d'épanouissement.

Peace in our hands

Cultivons la paix

Cultivemos la paz

السلام بين أيدينا

Мир в наших руках

让我们播种和平

Thèmes du « MANIFESTE 2000 »

1. RESPECTER TOUTES LES VIES
2. REJETER LA VIOLENCE
3. LIBERER NOTRE GENEROSITE
4. ECOUTER POUR SE COMPRENDRE
5. PRESERVER LA PLANETE



logo
de cette campagne

Armand HUBERT

Saulxures-sur-Moselotte ===== *

La dinamismo de Ginette Martin ne konas limojn ! Gastigantino de *Roman Dobrzynski* en la kadro de lia turneo en Francio, ŝi programis prelegon en la " Maison de la Culture et des Loisirs " de *Gérardmer*, kuplignita kun pikniko.



Du ĵurnalistoj grave implikiĝis en la evento. Sekve aperis longa, interesoplena artikolo en la gazeto " *Vosges-matin* " sub la mensotrafa titolo : « *Esperanto : le film de l'espoir* ».

La preleganto motivigis la ĉeestantojn interalie per la projekcio de lia aludita dokument-filmo " *Ora Bona Espero* ".

Famiĝas en tuta esperantio la travivaĵoj de tiu "farmo-bieno" por infanoj en Brazilo, kreita de la paro *Ursula* kaj *Giuseppe Grattapaglia* antaŭ 50 jaroj ! Indas aldoni, ke tiun specifan edukejon subtenas finance esperantistoj el la tuta mondo kaj la " *Rotari-Klubo* ".

La pola ĵurnalistino haltis samcelane en Nilvange, la 21an de majo, laŭ iniciativo de *Thionville-Esperanto*.

=====

sukceso de la Eo-staĝo en la kastelo de Nilvange (FR – 57)
23 / 28ajn de aprilo 2012

21 enpartoprenantoj el Belgio, Bretonio, Provenco, el departementoj Aisne, Aube, el Parizo, Liono, Tuluzo, Verduno, Thionville kaj regiono.

Tre bona etoso. Eminentaj kaj simpatiaj gastoj, daŭre pretaj helpi min kaj la nemultajn deĵorantojn de la kastelo ...

Aparte mirinda kadro, komforto, bongustaj manĝoj ellaboritaj de senkompara kuiristino, ĉiam preta kontentigi nin, same kondukis la kastel-dungitaro ; Men ciindas la " *potée lorraine* " (lorenana legom-viandaĵo) je la menuo de la merkredo-vespero, en la restoracio

de Algrange, " *Forketo de la ministro* " !

Du elstaraj momentoj de amika kunĉeado, dum kiuj ni aprezis la " *lorenan mirabel-Kiron* " kaj la ŝaŭmvinon de luksemburga Mozelo, ofertitaj de Marie-Josée Behm kaj Bernard Vivier, sen forgesi- la " *ĉampanon* " de Jennifer kaj Serge Fandard.



Eminentaj instruantoj gvidis kursojn : Renée Triolle, Josée Lafosse kaj Antonio Quijada.

Aldoniĝis variaj kaj interesoplenaj ekskursoj : " *Romia vilao* " de Borg (DE), fuortoj de *Douaumont* kaj *Vaux*, vizitoj trafe komentitaj de Catherine Kremer, vizito de la nacia muzeo pri minejoj de Luksemburgio en *Rumelange*, dum kiu, sen retenemo, aludis la gvidisto la penigajn laborkondiĉojn de la ministoj, kaj ilian senĉesan bataladon fronte al la tiamaj « posedantoj », cele plibonigon de la ĉiutaga vivo.

Renée Triolle gvidis nin tra la urbo Thionville, kun malkovro de la muzeo de loka historio en " *la Tour aux Pucès* " (turo de la puloj !).

Mi ne forgesu menci la riĉan kultur-programon : du filmoj de Bernard Vivier kaj Marie-Josée Behm pri Hamburgo kaj pri la UK 2011 en Kopenhago, prezento kaj filozofio de la tiel nomataj "liberaj programoj" en informadiko klarigitaj de Thomas Cordonnier, prelego de Renée Triolle pri " *Uralo antaŭen !* ".

Malkovro de la regiono, historio kaj kultura heredaĵo de Nilvange kun ĝia "laborista domaro" ... ĉion aprezis la staĝanoj, inter kiuj kelkaj venis de malproksime !

Tri amikoj el la "Forumo de la Civitanoj" ĉeestis la prelegon de Renée Triolle. Sinjorino Presti, ĵurnalistino de la loka gazeto *Le Républicain Lorrain*, raportis skribe kaj fote pri la aludita vespero.

Mi denove dankas al ĉiuj geamikoj, kiuj ebligis sukcesigi nian renkontiĝon, disponigante helpon, servojn, konsilojn, subtenon kaj solidarecon en malfacila momento, kiun mi travivis, pro forpaso de mia edzino la 14an de aprilo. Dankon al la supre cititaj kal al tiuj, kiuj ne povis enpartopreni, Bernard, Marie-Josée, Daniel Cano, Solange et Gérard, Maria, Mchel M. ...

Nu, ĉio tio instigas reokazigi saman eventon venontjare !

Bruno HENRY

LA LUAR-KASTELOJ KAJ LA EO-KULTURDOMO DE GRESILLON (FR)

Tiu artikolo celas allogi esperantistojn kiuj emas malkovri la imponan kulturan heredaĵon de la regiono de Francio inter du riveroj, *Loire* kaj *Loir*, okaze de restado en nia Kulturdomo,.. Jes ja, nia kastelo situas je 30 kilometroj de la riverego *Loire* !

La konstruistoj de la pasinteco en tiu areo profitis de la donacoj de la naturo, nome la ŝtono kalka kvarcglima (france: *tufeau*) kaj la ardezo blua.


La « Luar-kasteloj » plej ofte originas de fortikaĵoj de mez-epoko.

En Eŭropo, de la komenco de la 15a jc., la reĝolando Francio estis ankoraŭ ne firme starigita, eĉ oni povas imagi, ke la angla reĝo (la familio *Plantagenêts*) povus krei imperion en Eŭropo kun Francio kiel propra posedaĵo, tiam la francaj reĝoj ekloĝis en kasteloj de la valo de Luaro, nome *Charles VII* en *Chinon*.

Sekvu la francajn reĝojn, « les Valois », kiuj restadis en la Luarkasteloj...

- 1- Vizitu la fortikaĵon de **Chinon**, kiu entenas reĝajn loĝejojn kun tipaj fenestroj de la 15a jc.; oni bele finrestaŭris ilin antaŭ 2 jaroj.
- 2- Renkontu *Charles VIII* en **Langeais**, kiu edziĝis kun *Anne de Bretagne* en la kastelo en 1491.
Apud Langeais, situas la fama kastelo de **Azay-le-Rideau**, la juvelo de la renesancaj konstruaĵoj.
- 3- *Charles VIII* naskiĝis en la kastelo de **Amboise**, konstruigis reĝan loĝejon dank'al italaj laboristoj (komenco de la franca renesanco), kiam li ekregis en 1491, kaj mortis tie pro frapo sur la supra sojlo de pordo !
Vi renkontos *Leonardon de Vinci* kaj la lastan reĝon, kiu vivis en Luar-kastelo, *François "la unua"*.
Proksime de Amboise, situas la kastelo de **Chenonceaux**, nomita la "kastelo de la damoj", tie vivis *Diane de Poitiers* kaj poste *Catherine de Médicis*.
- 4- *Louis XII* naskiĝis en la kastelo de **Blois**, li edziĝis kun *Anne de Bretagne*, kiam *Charles VIII* mortis sen heredanto, kaj ili loĝis ĉefe en tiu kastelo. *François I*, la reĝo kiu sekvis, konstruigis novan alon en la stilo renesanca.
- 5- Proksime de Blois, situas la grandioza kastelo de **Chambord**, ne kastelo por loĝi sed konstruita de *François I* por ripozi post ĉasado en la granda arbaro ! Provu observi aprojn kaj cervojn tie !

Kaj jen, lernu pri nia "esperantista kastelo" !



Ĝis la 16-a jc., la bieno estis posedaĵo de la familio *Le Bigot*, kiu entenis multajn reĝajn oficistojn kaj juĝistojn . La unua nobeldomo estis konstruita ĉirkaŭ 1585, kaj eble videblas fenestro de tiama stilo en la nuna kastelo.

Kiam la bieno iĝis posedaĵo de la nobela familio *Ferrière* en 1878, gravas al la nova okupanto de *Grésillon* doni al tiu malnova loĝejo novan aspekton.

En tiu-ĉi epoko, floradis kasteloj laŭ nov-gotika stilo, kies iniciatinto estis la fama arĥitekto *René Hodé*. La novaj posedantoj do transformis la malnovan kastelon, kaj videblas ankoraŭ hodiaŭ la aspekto de vasta rezidejo kun siaj kromkonstruaĵoj .

Post la dua mondmilito, multaj posedantoj de kasteloj devis vendi ilin, tiam oni bezonis konstruaĵojn por ebligi sociajn agadojn, ekzemple organizi somerajn feriejojn por la infanoj de la laboristoj,

floris la « popola edukado ». Al tiu movado apartenis la esperantistoj, plimulte instruistoj, kiuj kreis nian societon por aĉeti la bienon en 1953. Sed nun, multaj kasteloj kiuj sekvis similan destinton, ne plu estas posedaĵoj de senprofita societo aŭ asocio pro la grandega kosto de bona renovigo. Nia Eo-societo tamen plu vivas kaj posedas tiun belegan bienon.

Hodiaŭ, la komitato elektita en 2010 klopodas sekvi vojon de malfermo al la socio kaj de longa uzo dum la jaro. Tiel ni povos konservi la Eo-kastelon, kies estonta profesia administrado certigos longdaŭran funkciadon.

Mi invitas vin esplori niajn ret-paĝojn kastelo@gresillon.org por scii pli !....
Sed jam ĉi-kune, riĉa kaj multfaceta program-resumo por la somer-periodo 2012 !

Jannick Huet

« ils » avouent enfin...
mais ne veulent pas admettre la solution !

Parler un anglais parfait,

(article paru dans le *The New York Times* - 1 juin 2012)

Un niveau d'anglais insuffisant chez un pilote peut provoquer des accidents mortels. Parfois il s'agit simplement d'un incident amusant, comme l'enregistrement en 2006 d'échanges entre un commandant de bord d'*Air China* et un contrôleur aérien de l'aéroport *JFK* de New-York. L'Américain est de plus en plus exaspéré par l'anglais calamiteux du pilote, et on entend la colère monter dans sa voix.

Mais la liste des catastrophes aériennes causées dans le monde principalement par **des malentendus entre le cockpit et la tour de contrôle** est longue et tragique, En 1977, par exemple, deux Boeing 747 sont entrés en collision sur une piste à *Tenerife*, aux Canaries. La catastrophe, qui a fait **583 victimes**, a eu lieu dans un brouillard dense. Des incompréhensions entre l'avion sur la piste et les contrôleurs du trafic aérien concernant les ordres donnés sont venues compliquer le tout. Les autorités internationales de l'aviation ont par la suite exigé que des formules en anglais standard, claires et bien connues, soient utilisées pour la circulation aérienne.

Le secteur aéronautique est en pleine expansion partout sur la planète, **ce qui redouble les craintes relatives aux compétences linguistiques des pilotes et des contrôleurs aériens.**

En octobre, l'Organisation de l'aviation civile internationale (OACI), une agence de l'ONU qui élabore des normes pour la standardisation du transport aéronautique, a émis des recommandations pour améliorer la formation en anglais.

Dans le domaine de l'aviation, où la communication est censée être concise et sans ambiguïté, **une langue aussi riche en nuances que l'anglais présente bien des difficultés.** Pourtant, il semble irrémédiablement devenu la langue du transport aérien, et le fait que d'avantage de pays soient désormais des acteurs majeurs de l'aviation commerciale renforce la nécessité de consolider les compétences de communication.


Paul Musselman dirige *Carnegie Speech*, un centre d'apprentissage des langues qui forme ceux qui ne sont pas anglophones de naissance -mais doivent recourir à l'anglais au travail- à s'exprimer plus clairement. Son établissement offre un programme de cours appelé « *Climb Level 4* » qui amène les pilotes internationaux jusqu'au niveau standard 4 défini par l'OACI.

Ce dernier implique que le vocabulaire et la grammaire soient maîtrisés, mais aussi que la prononciation, l'accentuation, le rythme et l'intonation soient suffisants pour communiquer clairement et rapidement en anglais. *Carnegie Speech* offre des cours de perfectionnement aux pilotes étrangers en partenariat avec l'école internationale de pilotage de la *Pan Am Flight*.

« *Notre but est d'enseigner à quelqu'un comment parler anglais afin qu'il soit compris* », explique Paul Musselman.

Et cette langue peut être la source de difficultés. « *J'étais militaire pendant 11 ans chez les bérets verts américains, déclare ce dernier. Quand on apprenait à sauter en parachute, plutôt que de répondre simplement 'non' à une question, les soldats devaient employer 'Not clear'. C est parce que 'No' ressemble dangereusement à 'Go' (allez), précise-t-il. Et pour un parachutiste qui attend, près de la porte de l'avion, qu'on lui ordonne de sauter, le maître mot est « Go ! ». C'est clair ?*

JOE SHARKEY



Tenerife - 27 mars 1977

Tragika, okulfrapa kolizio !

Superflua komento !

« La Informilo » plurfoje raportis pri tiu problemo de interkomunikado en artikoloj, kiuj elmontris la valoron de Eo !

Vasta reklama sukceso por Esperanto en Albanio

Estas jam pruvite ke neesperantistoj dediĉas atenton al Esperanto nur kiam ni demonstras ties utilecon praktikan. Tiel oni provas, ke la lingvo funkcias kaj povas uzati por esprimi ĉion.

Antaŭ tri jaroj, mia amiko el Pollando, Tomasz Chmielik, alskribis min retmesaĝe petante, ke mi peradu ĉe la albana verkisto, jam mondkonata, Fatos Kongoli, ke li permesu la tradukon kaj eldonon de unu el ties romanoj, ĝuste la *"Hunda Haŭto-n"*, kiu konis ĝis tiam 7 tradukojn fremdlingven.

Estis ia koincido, ke Fatos kunstudis kun mi matematikon en la universitato dum la jaroj 1963-1967, kaj daŭre tenis amikajn rilatojn kun mi. Do ne malfacilis por mi, lin konvinki pri la propono de Tomasz, kvankam li havis siajn naturajn dubojn pri Esperanto. Tiel mi akiris de li ne nur la permeson, sed ankaŭ la eblecon ne kompenzi finance, ĉar la legantoj de la internacia lingvo konsistigas ankoraŭ relative malgrandan komunumon.

Sekvis pluraj retmesaĝoj inter mi kaj Tomasz. Ĉi lasta kompilis koncernen kontrakton oficialan, kiu estis signita de ambaŭ ili.

Pasis jam sufiĉe da tempo ĝis Tomasz anoncis, ke la traduko finiĝis sukcese, same la provlegoj far eminentaj esperantistoj. Plue li raportis pri la klopodoj trovi sponsorojn por la eldono. Inter ĉi lastaj aliĝis ankaŭ mia amiko el Elzaso, Edmond Ludwig, cetere unu el la provlegantoj.

Sed Fatos ankoraŭ ne kredis, ke la libro aperos envere ĝis januaro 2012, kiam mi enmanigis al li la unuan ekzempleron de la libro en Esperanto. Li ege feliĉiĝis, eble pli ol kiam liaj romanoj estis tradukitaj kaj publikitaj en pluraj lingvoj "grandaj" de nia kontinento, en Francio, Britujo, Italio kaj en Usono. Kial do? Ĉar ĉifoje temis pri "rara kaj ekzotika" lingvo, naskiĝinta relative malfrue, apartenanta al neniu nacio, sed legata kaj parolata almenaŭ en 120 landoj.

Li informis pri tio per aparta komunikletero la gazetojn kaj televiziojn, kio kaŭzis envere lavangon da intervjuoj miaj antaŭ ĵurnalistoj. Mi tute ne antaŭvidis, ke tiel mi povos sufiĉe efike kaj forte propagandi por Esperanto.

Tomasz estas skribinta pli frue al mi, ke li intencas venigi en Tirana-n grupon de esperantistoj polaj kaj aliaj por ĉeesti la eventualan promocion de la romano en Esperanto. Li aldonis ke li deziras traduki ankaŭ alian verkon de unu el la plej mondekonataj albana verkistoj, nome Ismail Kadare, plurfoje kandidato por la Nobel-premio kaj laŭreato de aliaj prestiĝaj beletraj titoloj, la romanon *"La Palaco de la Sonĝoj"*.

Denove mi peradis ĉe la elstara verkisto tra lia edzino Elena kaj akiris lian permeson por la traduko kaj eldono.



Fatos Kongoli, Tomasz Chmielik, Bardhyl Selimi

Plue, Tomasz sciigis ankaŭ pri la traduko de la kompleta poemkolekto de aliaj famaj poetoj albana- Luljeta Lleshanaku (el Albanio) kaj Ekrem Basha (el Kosovo).

Certe tio estis bonega okazo por propagandi nian Esperanton helpe de tiaj aŭtoritatoj sur la beletra kampo. Kaj fakte tiel okazis.

Ni faris plejeblojn por aranĝi konvenan programon de la vizitoj kaj renkontiĝoj de la grupo de Tomasz, kiu alvenis la 13-an de Aprilo 2012. Sekvis pluraj kontaktoj kun aŭtoritatoj, televizioj kaj gazetoj por instigi ilin akcepti la esperantistan alvenontan grupon fremdan dum unusemajna restado en Tirana.

La unua akcepto okazis en Akademio de Sciencoj, kies membro estas mem la verkisto Fatos Kongoli. La prezidanto de Akademio, prof. Gudar Beqiraj, rezervigis al la fremdaj esperantistoj tre varman konversacion en sia oficejo, babilante kun ili tre nature pri la rilatoj ambaŭlandaj kaj aprecante Esperanton kiel lingvon de "paco, amikeco kaj internacia bonkompreno".



Prof. Gudar Beqiraj akceptas la esperantistajn gastojn

Tiun posttagmezon grupeto el 5 esperantistoj estis invitita al 50-minuta intervjuo ĉe la televizia kanalo "Albanian Screen".

La ĵurnalistino, s-ino Ema Andrea, konata dram-aktorino, estis pretiginta tre saĝajn kaj trafajn demandojn pri la Esperanta Kulturo, al kiu respondis la polo Tomasz, la polino Ela, la latvino Mara, la svedo Gunnar kaj mi, do vere internacieca grupo.



Ismail Kadare



La ĵurnalistino Ema Andrea kun esperantistoj dum la TV elsendo

La venontan tagon okazis la promocio de la libro en la granda salono de la Akademio, kie estis invititaj krom la membroj, ankaŭ politikistoj, verkistoj, reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, diplomatoj, esperantistoj kaj pluraj ĵurnalistoj kaj televiziaj raportistoj kaj kameraoj.

La albana Centro de la Libro kaj eldonejo, kie aperis dekoj da romanoj de Fatos salutmesaĝis la ĉeestantojn, poste prelegis mem Tomasz Chmielik pri la valoroj de Esperanto kaj la motivoj instigintaj lin por la traduko, same Fatos Kongoli rakontis pri siaj unuaj duboj kaj poste pozitivaj konvinkoj pri Esperanto.

Estis probable la unua fojo ke aŭdiĝis en la kunveno neesperantista albana la parolata Esperanto, diskonigata tra la tuta lando danke al televizioj.

Tuj post la fermo de la aranĝo la ĵurnalistoj ĉirkaŭis Tomasz kaj min, petante de ni pliajn klarigojn pri Esperanto lingvo kaj kulturo.

La ĵurnalistoj estis ege surprizitaj kiam Tomasz anoncis la komencon de la traduko de unu el la romanoj de Ismail Kadare kaj alia romano de mem Fatos ("La perdinto"). Mi rememorigis al ili, ke Esperanto havas tradicion relative longjaran ankaŭ en Albanio (almenaŭ 105-jara) kaj ke la unua originala verko en Esperanto aperis tie ekde la jaro 1929!

Multaj fotoj estis faritaj, pluraj ekzempleroj de la romano "Hunda Haŭto" estis signitaj de la aŭtoro mem, kelkaj invitoj direktiĝis al la fremdaj gastoj. Vere, tute ne antaŭvidita sukceso!

La radiotelevisiaj novaĵoj tiun vesperon kaj venont-tage, preskaŭ ĉiuj tagĵurnaloj, dediĉis al tiu evento unu-du plenajn paĝojn.

La trian tagon la grupo de esperantistoj akceptiĝis en Ministerio de Kulturo de Direktoro pri Libro kaj Bibliotekoj, s-ro Ermir Nika. Ĉeestis ankaŭ la verkisto Fatos Kongoli kaj kelkaj albanaj artistoj kaj verkistoj. Ankaŭ tie la Esperanto estis la "laborlingvo", io tute nova en tiu ministerio.

La saman tagon ni akceptiĝis en la Fakultato de Fremdlingvoj de Dekano s-ino Klodeta Dibra. En sia oficejo ŝi raportis pri la historio de tiu fakultato kaj pri la lingva politiko de la registaro. Bedaŭrinde – rimarkigis ŝi, ĉio estas farata favore al la angla, inkluzive de la deviga

ekzameno de TOEFL- por la angla, kio ege seniluziigis kaj studentojn kaj instruistojn, ĉar tiel oni tute diskriminacias la ceterajn lingvojn, reduktante draste la nombron de studentoj de la franca, germana, itala, rusa, ktp. Komprenoble, -aldonis s-ino Klodeta- en tia etoso, Esperanto apenaŭ havas ŝancon por inkluziviĝi en la ŝtatajn instruprogramojn.

Poste ŝi ebligis al nia grupo renkontiĝi kun centoj da studentoj en granda aŭditorio, kie Tomasz prelegis en la internacia lingvo helpe de mia albana simultana traduko pri la esperanta kulturo kaj ties perspektivo, same pri la ebleco de postuniversitataj studoj pri interlingvistiko en la Poznana universitato.



Atenta studentaro dum prelego pri la Internacia Lingvo en la Universitato de Tirana.

La pasiiginta pola instruistino Jolanda improvizis dekminutan provlecionon de Esperanto per la rekta metodo antaŭ almenaŭ 40 gestudentoj. Sur la tabulo ni notis la adresojn retajn, kie la gestudentoj povus trovi tutfacile la kompletan korespondan kurson de Esperanto por albanoj.

Samideano Stanislav Mandrak tutan tempon "registris" niajn renkontiĝojn per sia fotilo.

La ceteraj tagoj pasis per ekskursoj en la urbo (promenante tra la granda bulvaro, vizito en la Nacia Historia Muzeo, ekskurso al la monto Dajti per telfero kaj al la kasteleto de Petrela per buseto), al la antikva muzea urbo de Berat (2400 jaraĝa, kun granda kastelo kaj mirindaj karakterizaj loĝkvartaloj), al la historia urbo Kruja (kastelo de Skanderbeg, mezepoka bazarlo k.a.), al marhaveno de Durrës (kun la plej granda amfiteatro en Balkanio kaj ties longa plaĝo).

La adiaŭa vespermanĝo okazis en popola karakteriza restoracio en gaja etoso esperantista.

Bedaŭrinde la vetero tutan semajnon estis ne kiel kutime tiuperiode en Abanio, pluvis, eĉ pluvegis, malvarmis, sed tio neniom paligis la entuziasmon de esperantistoj.

Konklude, la semajno de vizito de grupo de Tomasz atingis sian celon: disvastigi kaj propagandi Esperanton en Albanio utiligante eĉ tian eventon kia ja estas la enesperantigo de la romano de la fama albana verkisto. Estas nun nia devo bone mastrumi tiun atingon.

Bardhyl Selimi

Seiki kaj Collin japana kaj franca pentristoj de la 19a jarcento

En parko Ueno en Tokio troviĝas la domo por la memoro de japana pentristo KURODA Seiki, kiu havis grandan rolon en la enkonduko de franca Impresionismo al Japanio. Meze de la domo oni povas admiri lian ĉefverkon " Apud lago " Tiu pentraĵo estas unu el la plej konataj artverkoj en Japanio. En la pentraĵo lia edzino Teruko havas ventumilon enmane vestita en blua kimono, sidante sur la ŝtono sur la bordo de lago.



Apud Lago 1897



Portreta pentraĵo pri Kume Keiichiro. (1889)

Seiki unuafoje renkontis Kume Keiichiro en Parizo en oktobro en 1886. Li havis la saman aĝon kiel Seiki, kaj li daŭre havis kontaktojn kun Seiki dumvive. Ankaŭ li iam lernis pentradon sub la gvido de Collin, kaj ili tuj iĝis tre amikaj. Poste li komencis instrui arkeologion kaj anatomion en la Universitato de arto de Tokio post lia reveno al Japanio. Li aktivis ĉefe kiel edukisto.

Seiki bezonis unu monaton por finpentri tiun pentraĵon en Hakone en la gubernio Kanagawa. Li naskiĝis en la gubernio Kagoshima la 9an de aŭgusto en 1866.

Li estis adoptita de sia onklo (frato de patro Kiyotsuna) en 1871 kaj iris al Tokio por vivi kiel knabo en la domo de Kiyotsuna en 1872. La domo estis vasta, 2100 kvadratmetroj, kaj li povis vivi agrablan vivon tie. Li estas konata pro sia feliĉa vivo. Li atingis sian dekan jaron kaj eklernis unue la anglan kaj poste la francan. Li sukcesis esti akceptita de fremdlingva lernejo, kiam li havis 17 jarojn. Li lernis la francan por studi juron, ĉar tiutempe japana ŝtato imitis la francan juran sistemon, kiam ĝi ordigis civilan leĝon. La ŝtato sendis lian bofraton al la franca vic-ambasadorejo, tial kuniris Seiki, kiu forte deziris iri al Francio por lerni juron en 1884. Li loĝis en Francio dum 9 jaroj. Sed li ŝanĝis sian decidon. Li decidis ĉesi lerni juron kaj eklernis pentradon sub la gvido de franca akademia pentristo Raphaël Collin (1850-1916). Kial li ĉesis la lernadon de juro? Li renkontis alian pentriston Huji Masazo kaj pentraĵvendiston Hayashi Tadamaso en la japana vic-ambasadorejo, kaj tiuj artistoj, kiuj konstatis lian talenton, forte rekomendis al Seiki fariĝi pentristo.



KUDORA Seiki



Floréal (1886) pentrita de Raphaël Collin

Collin ekspoziciis tiun oleo-pentraĵon en Salono en 1886. La juna virino, kiu kuŝas sur herbejo, estas nuda. Pro tio, tiu pentraĵo altiris atenton. Sed en la teksto pri la Salono oni skribis, ke ĝi ricevis apartan laŭdon pro sia gracio en la universala ekspozicio en 1889. La Muzeo de Luxembourg aĉetis tiun pentraĵon kaj ĝi kortsitis Seiki, kiu lernis sub la gvido de Collin.



Ekzemplo de biombo, japana rigardoŝirmilo ĉefe uzata kiel ornamaĵo

Li skribis sian decidon al la adoptinto Kiyotsuna, sed ĉi-tiu estis dumvive kontraŭ lia deziro. Ankaŭ Huji lernis pentradon en la ateliero de Collin, kaj tio influis lian selektadon de instruistoj. Collin ŝatis japanajn aferojn kaj kolektis japanajn "biombojn" (japanaj rigardo-ŝirmiloj ĉefe uzataj kiel ornamaĵoj), ceramikaĵojn, noajn maskojn ktp. Oni diras, ke Collin iam ridete diris, ke li estas amanto de japanajoj. Tiu japaneco altiris la japanajn pentristojn al li. Seiki akiris kapablon por pentri pejzaĝojn, figurojn, nudojn ktp dank'al Collin. Li ankaŭ lernis kiamaniere



pentri helajn pejzaĝojn kun la sunradioj kaj enkondukis delikat-tuŝan pentr-manieron en la japanan pentristan mondon.

Pejzaĝo de Parizo (1890).

Seiki pentris ĉefe naturan pejzaĝojn kaj suburban naturon, kiam li pentris pejzaĝojn.

Li malofte pentris urbon.

En la malproksima fono oni vidas Ejfelturon.

Tiutempe li iradis tien kaj reen inter Parizo kaj Grez.



Morta kampo (Grez) (1891)

Ebena kamparo ĉirkaŭas la vilaĝon Grez-sur-Loing. Laŭ la letero de Seiki la vintra pejzaĝo estas pli bela ol la somera. Eĉ post lia foriro, multaj japanaj pentristoj vizitis la vilaĝon, por serĉi modelon, aparte Asai Chu pentris ĉefan art-verkon tie.

M.M.

Priatentu ! ... Memorinda dato !

En ĉi-tiu bulteno vi malkovros inform-dokumenton kaj aiiĝilon por nia 72a regiona staĝo kupligita kun la 34a BAVELO-Seminario, en Ortenberg (DE)

21 / 23ajn de septembro 2012

Grava atentigo: loĝebleco en la staĝejo, *Junulargastejo Kastelo Ortenberg*

aŭ en proksima hotelo (vidu adreson) sed per mem-mendo !

Ĝuinda programo atendas vin ! ... Ne pre enpartoprenu !



... neatendite ! Budhaa monaĥo ĉina parolas esperanton ...

Nia samcelano *Jacques Baratié* kutimas provizi nin je interesaj, multifacetaj ret-filmetoj, kiuj atestas al eventualaj skeptikuloj la vivantecon de nia dua lingvo.

Ĉi-foje ni taksas aparte ne nur vidinda sed ankaŭ aŭskultebla intervjuon de tibeta monaĥo, kiun renkontis survoje irlanda mondvojaĝulo!

Surhavante verdan stelon sur sia robo, li vizitigis al sia gasto parton de la monaĥejo, bonvoleme satigante la scivolon de la intervjuanto.

Ne maltrafu la okazon malkovri raran vivsekvencon pri « hobio » de klera monaĥo ! Miru viaŭvice malfermante la ĉi-suban retejon:

www.youtube.com/watch?v=fZcwpCgZMUK



Pri Edmond PRIVAT okaze de la reeldono de lia verko INTERPOPOLA KONDUTO en la eldonejo HEJME LIBRO-MONDO



Freŝbakitaj esperantistoj kutime ekkonas Edmond PRIVAT tre rapide post ilia esperantistiĝo pro liaj esperantlingvaj verkoj *Karlo*, *facila legolibro*, kaj *Vivo de Zamenhof*. Ili ankaŭ rapie ekscias, ke li amikiĝis kun Hector HODLER, la fondinto de UEA ke en la sama jaro ili fondis la gazeton *Juna Esperantisto*, ke la tiam 16-jara junulo enpartoprenis la unuan *Universalan Kongreson* en Boulogne-sur-Mer en 1905, kien li iris piede kaj kie li -laŭ tiamajn partoprenintoj- « elokvente parolis ».

Sed necesas scii pli pri la vivo de Edmond PRIVAT por malkovri kiel tiu samideano

sukcesis iĝi honora konsilanto kaj vicdelegito de Irano ĉe la tiama *Ligo de Nacioj*, kaj tie prezenti Esperanton.

Li ĝin ankaŭ prezentis al la Internacia *Labor-Oficejo* kaj al la *Universala Telegrafa Unuiĝo*. Krome, li organizis plurajn internaciajn konferencojn, ekzemple pri instruado de Esperanto en Ĝenevo en 1922, Turisman kaj Komercon Konferencon en Venecio en 1923, Internacian Radio-Konferencon en Ĝenovo en 1924, Konferencon pri Komerco kaj Industrio en Parizo en 1925, Konferencon, titolitan "*Paco per Lernejo*" en Prago en 1927, kie Esperanto estis sola oficiala traduklingvo.

Jes, necesas scii, ke li naskiĝis en 1889 en franclingva Svisio, ke jam en 1907, post akiro de la bakalaŭro, do 18-jara, li turneis tra Usono, kie li prelegis pri Esperanto kaj la franca literaturo.

Post plustudado en Cambridge kaj en la pariza universitato SORBONNE, li akiris licencion. Dum la unua Mondmilito li loĝis en Parizo kaj kunlaboris kun la franca gazeto *Le Temps*, kiu sendis lin al Aŭstrio kaj al Pollando. Liaj artikoloj pritraktas la nacian suverenecon. Tiam li amikiĝis kun la pacista franca verkisto Romain ROLLAND, *Nobelpremiito pri Literaturo* en 1915.

Post la milito Edmond PRIVAT prezentis sian pribeltran doktoriĝan disertacion pri la tiama pola problemaro.

Post aludo al sia amikiĝo kun Romain ROLLAND, nepre necesas aldoni liajn personajn rilatojn kun GANDHI (kun kiu li vojaĝis ŝipe al Hindio) kaj NERUH. Ne mirigos do, ke li ege kunlaboris kun la kvakeroj, pacistoj sendogmecaj.

La fakto, ke li estis civitano de neŭtrala lando ekster la militaj konfliktoj tiamaj kun jama tradicio de pluretna kunvivado, en kiu sidejis la Ligo de Nacioj, la unua "provejo" por tutplaneda pritraktado de interŝtataj rilatoj, certe ankaŭ kontribuis al senpartia observado de konfliktoj interŝtataj. Kaj en periodo de pli kaj pli agresema naciismo li publikigis en 1931 la franclingvan libron *Le choc des patriotismes* en la filozofia kolekto Felix Alcan. Jam en 1935 ĝia traduko kun la titolo *In-*

terpopola konduto aperis en Budapeŝto ĉe *Literatura Mondo*.

Ĝin reredaktis Tomasz CHMIELIK kaj Claude GACOND en 2006 kun prezento de Andreas KÜNZLI, kiu plej trafe sukcesis resumi ege densan pensaron en la sekvaj linioj : *Kiel ideologo -aŭ filozofo- de la interpopola konduto, Privat akre kritikis la vantecon de la gentoj, la sovaĝecon de la militantaj civilizoj, la hipokritecon en diplomatio kaj nesincerecon en interŝtataj rilatoj. Li atentigis pri la malmoraleco en la politika kaj armea praktikoj kaj skurĝis la ekscesojn rezultantajn el pasio kaj venĝo en la nomo de la "nacia religio."*

Ke la libro daŭre aktualas, plej perkute ilustras la fotoj de la kovrilpaĝoj, kiuj konatas tra la mondo kaj dokumentas kruelecojn tra la lastaj 80 jaroj !



Jen libro plej elstara, kiun ĉiu esperantisto sin rekonanta en la lukto por la Homaj Rajtoj devus legi. Legi ja ne estas la ĝusta vorto, necesus ĝin trastudi, ĉapitron post ĉapitro. La enhavo de ĉiu ĉapitro estas klare anoncita kaj segmentita.

Kia mirinda dokumentaro por seminarioj, ankaŭ pro la fakto, ke eĉ hodiaŭ la situacio ja ne multe evoluis !

Cetere : reeldono de la franclingva elĉerpita verko sukcesus montri, ke iuj klarvidaj esperantistoj estis antaŭuloj en plej gravaj prihomaj temoj ! Sed ĉu iu sukcesos konvinki sufiĉe konatan eldonejon ???



El nia libroservo



Informoj...

⇒ La libroservo partoprenos la komunan semajnfinan staĝon organizitan de Bavelo kaj Esperanto France Est en Ortenberg la 21a/23ajn de septembro 2012.

Multaj el niaj 680 titoloj atendas vin tie sed se vi volas certe trovi dezirata(j)n libro(j)n, sen devigo ĝin (ilin) aĉeti, sendu al mi mesaĝon al libroservo.efe@wanadoo.fr J-L. T.



Resumoj, recenzoj, opinioj...el Edmond Ludwig

⇒ Unua romano el Albanio tradukita al Esperanto : *Hunda haŭto* (Fatos KONGOLI) Tradukis Tomasz CHMIELIK Eld. Książnica Podlaska im. Łukasza Górnickiego Białystok 2011 (aliaj informoj sur la dua libroservo-paĝo)

Fatos KONGOLI estas – kun Ismaël KADARÉ – unu el la albanlingvaj aŭtoroj plej ofte tradukita al fremdaj lingvoj. Nia albana samideano, Bardhyl SELIMI, kiu agrabligis printempan staĝon de EFE en 2011, informis min, ke pola samideano, Tomasz CHMIELIK, estis tradukinta al Esperanto la romanon *Hunda haŭto* de Fatos KONGOLI kaj li petis reviziadon de la traduko fare de alilingvano. Tion mi akceptis fari kaj tiel mi malkovris tiun libron kun ega plezuro !

Nur post la falo de la albana diktaturo Fatos KONGOLI komencis eldoni, sed en lia verkaro vi ekscios pri la vivo dum tiu diktaturo kaj en la nuna Albanio. Ankaŭ en *Hunda haŭto* vi malkovros ambaŭ legante pri la vivo de ĉiuj virinoj, kiujn li amis.

Aliloke en tiu numero de LA INFORMILO vi ekscios pri la sukcesa informkampanjo pri Esperanto organizita de Bardhyl SELIMI en TIRANA okaze de la prezento de tiu esperantlingva traduko kun la ĉeesto de Fatos KONGOLI.

Ties legado cetere ankaŭ instigos vin al aĉeto de pliaj titoloj de Fatos KONGOLI en la franca lingvo : *Le Dragon d'ivoire, L'ombre de l'autre, Peau de chien kaj Tirana blues*.

⇒ *Hetajro dancas* (Eli Urbanová) Fonto 1995 (aliaj informoj en Informilo n° 157)

Leginte pri la forpaso de la ĉeĥa poetino Eli Urbanová, mi konstatis, ke mi ankoraŭ ne legis ŝian prozan verkon *Hetajro dancas* ...

Post lego de tiu aŭdaca tagfurnalo, mi vere demandis min, kiel reagi kaj kiel emigi al lego. Fine mi elektis mallongan eltiraĵon ĉe la fino de la verko, kiu lasos vin decidi :

- Akuzitino, mi esperas, ke vi scias, kial vi estas ĉi-tie ?
- Kompreneble, sinjoro prezidanto. mi vekis antipation per mia prozo *Hetajro dancas* ...
- Antipatio estas febla vorto. Ni parolu prefere pri ĝenerala skandalo ! Pro la motivo, kiun vi ĵus enkondukis, vi kulpas delikton laŭ paragrafo ...
- Trankvile min punu, sinjoro prezidanto. Sed mia konscienco estas pura. Jes, pura ! Ĉar tiel, kiel mi tion priskribis, ĝi efektive okazis ! Plaĉu tio al iu aŭ ne ! Cetere kiu timas veron, tion ne legu !

Certe vi kuraĝos legi aŭdacaĵojn, kiaj ne oftas en niaj esperantistaj rondoj !

⇒ *Mia stelo* (Felicja Raŝkin-Nowak) Książnica Podlaska im. Łukasza Górnickiego Białystok 2011 (aliaj informoj sur la dua libroservo-paĝo)

Neforgeseblas la naziaj amaspersekutoj kaj la amasneniigoj antaŭ kaj dum la Dua Mondmilito. Multaj esperantistoj juddevenaj suferegis. Unu el ili estas Felicja Raŝkin-Nowak, nevino de la en Białystok fama ĵurnalisto kaj agadema esperantisto Jakobo ŜAPIRO, kies bildo nun aperas sur fasado de domo en Białystok. Ŝi rakontas sian vivon antaŭ la milito, poste la vivon en la geto kaj sian fuĝon helpe de eksteruloj. Ŝi sukcesis pluvivi dank'al konata kamparana familio, kiu kaŝis ŝin kaj poste ankaŭ partizanon en subtegmentejo de bovinejo.

Post la milito ŝi sukcesis havi postenon ĉe Pola Radio, sed ŝia pli kaj pli kritika sinteno kontraŭ la partio kaj la en Pollando renaskiĝinta antisemitismo en 1967/68 puŝis ŝin al elmigrado. Ŝi nun vivas en Danlando. Tradukis tiun korporeman membiografion Tomasz CHMIELIK .

⇒ *Kompaktdisko* (aliaj informoj sur la dua libroservo-paĝo) :

Se vi ŝatas kaj la ritmojn kaj ankaŭ la melankolion de jidaj kantoj fare de profesia kantistino, ne-esperantistino, sed kun perfekta prononco, aŭskultu en la jida kaj en la esperanta traduko de Mikaelo BRONŜTEJN la sekvan KD-on :

La hejmon havas mi ... *Kantoj de Mordeĥaj Gebirtig (1877 – 1942)* Prezentas Irena URBAŬSKA kun akompano de Lesław Lic

(Kunliverata estas libreto kun la tekstoj ISBN 978-83-60368-72-5)



Por mendi librojn :

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan mendilon)
- per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»
- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkosto)


3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC :

PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo



Novajoj :



1 2 3 4 5 6 7 8

1. **Ĉio en ordo**, Poezio, Zbigniew Patryck, Podlaĥia Biblioteko., 126 p, 6,00 €. Pollingvaj poemoj sur duono de la libro, esperantlinvaj sur la alia duono, kaj koloraj pentraĵoj centre. Tradukoj de Lidia Ligęza kaj Tomasz Chmielik.
2. **Ĝaj rakontoj pri la katedralo de Strasburgo**, Historio, Sůzel Pailhes, J M Editions, 50 p, 12,00 €. Trilingva ilustrita libro. Kaj trin infanoj, kiuj akompanas nin al malkovro de la sekretoj de la granda katedralo.
3. **Hunda Haũto**, Romano, Fatos Kongoli, Podlaĥia Biblioteko, 140 p, 8,00 €. Vidu recenzon sur unua paĝo !
4. **Kronprinceĉzino**, Romano, John Francis, F.E.L., 192 p, 16,00 €. Laŭ priskribo de la eldonisto : "nova, triĉapitra, rakonto pri intrigoj, miskomprenoj kaj sekretaj bataloj en mezepoka etoso atendas vian legadon !"
5. **La hejmon havis mi**, Kd-libro, Mordeĥaj Gebirtig, Prymat, 62 p + Kd kun 17 kanzonoj, 8,00 €. 17 kanzonoj esperantlingvaj kaj jidlingvaj. Vidu recenzon sur unua paĝo
6. **Mia stelo**, Romano OpoFelicja Raszkin-Nowak, Prymat, 8,00 €. Vidu recenzon sur unua paĝo.
7. **Podlaĥia Antologio**, Poezio Kolektita de Jan Leończuk, Hejme, 140 p, 8,00 €. Verkaĵoj de nuntempaj poetoj el orienta regiono de Pollando kaj komentoj pri 72 poetoj. Tradukoj de Lidia Ligęza, Tomasz Chmielik kaj Istvan Ertl.
8. **Mi forgesis vin miaj arboj**, Poezio, Jan Leończuk, Hejme, 228p 8,00 €. verkaro de bialistoka Poeto. Tradukoj de Lidia Ligęza kaj Tomasz Chmielik.



Nenovaĵoj ĵus alvenintaj:




9




10



11



12



13

9. **Alia Venecio**, Turismado, Predrag Matvejević, Hejme., 144 p, 6,00 €. Promenado en Venecio kaj malkovrado de ties kuriozaĵoj.
10. **La Roma Triptiko**, Religia poezio, Johano-Paŭlo la Dua, Hejme, 32 p, 6,00 €. Tradukitaj poemoj de la forpasinta Papo,
11. **Mediteranea breviarjo**, Turismado, Predrag Matvejević, Skonpres, 232 p, 8,00 €. Ĉi-foje promenado en tuta Mediteranea Maro.
12. **Reala homo en la homa realo**, Biografio, Tomasz Chmielik, Skonpres, 56 p, 6,00 €. Biografio de pola raportisto
13. **Tamen perdota**, Movado, Tomasz Chmielik, Svidniko, 12 p, 2,00 €. Reproduktaĵoj de manuskriptoj de Edmond Privat, grava aktivulo de la esperanto movado.

Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn:

-
-
-
-
-

al jena adreso:

S-ro/ino

-
-
-
-

En

la

Subskribo:

... ni provu  rideti ! ...

Du vizitantoj babilas en salono de la urba biblioteko.

« Mia edzo, rakontas unu, decidis lastemajne « aerumi » la bretojn de sia laborĉambro, sur kiuj vertikalas jam de longtempe libroj neniam legitaj... kaj legotaj. Opiniante, ke pluraj el ili povus interesi legemulojn, mi arigis dudekojn sur seĝon, kaj instalis ĉi-tiun sur seĝon, sur la trotuaro antaŭ nia domo. Invitkarton mi aldonis, sur kiu oni povis legi « libere forprenu !... »

- Nu, kaj ?..

- Vespere ili ĉiuj kuŝis sur la mallarĝa ŝoseo... kaj la seĝo estis for ! ».

Ĉi matene, S-ro Pedretti eniras sian laborĉambron kun unu okulo ŝvelkon-tuzita ...

Miras kolego, kiu pridemandas la kialon.

« Ĉiujare, je la unua de aprilo, mi tre ŝatas ellabori ŝercaĵon. Ĉirkaŭ la kvara matene, mi vokas telefone kelkajn amikojn, klarigante:

“ Divenu, kiu vekas vin ! ” ...

- Nu, kaj ... ?

- Hieraŭ, unu divenis ... ».



Eta legomnegocisto, en kvartalo, periferie de la urbo, konstatas, ke lia stando sur la trotuaro denove difektigis... Denove kulpas veturilo !

Preteriranto kompatas...

« Nu, imagu, plendas la vendisto, la help-instruantoj de najbara fak-lernejo pri aŭto-stirontoj kutimas trejniĝi sian lernantaron en ĉi-tiu vere mallarĝa strateto. Mi scias, ke mia vendo-stando kiel kutime estos difektiita, kiam mi aŭdas unu el la gelernantoj ĝoje ekkrii... « Hura ! Mi nun scias, kiamaniere oni devas manipuli la regostangon por retroveturi ! ... ».

Eta knabo devas viziti elementan lernejon... La patrino donas siajn lastajn konsilojn :

« Ci restos tute bonkondukta karuleto mia, ĉu ne ? Bone aŭskultu la instruiston, mia eta koro ! Ne forgesu surhavigi la mantelon dum la paŭzo ekstere, brasiketo mia, kaj ne kverelu kun la aliaj geinfanoj mia anaseto ! Nu, etan kison al via panjo eta ursido !... ».

Vespere, post la rehejmiĝo, malpacience scivolos la patrino :

« Nu, anĝeleto mia, ĉu ion interesan vi lernis hodiaŭ ?

- Jes, panjo, ek de nun mi scias, ke mi nomiĝas Petro ! ».

Iu patrino, kies edzo foriris pro profesiaj taskoj, alparolis ŝerce sian sesjaraĝan fileton:

“ Nu, karuleto, paĉjo estas for... Bonvolu anstataŭi lin. Kutime li sidas fronte al mi dum la manĝoj. Bonvolu sidiĝi sur lian seĝon, kaj ni provu interbabili pri diversaj temoj, kvazaŭ ni ambaŭ faras, cia patro kaj mi ... ”.

Konsentite ! Johano komencas manĝi... Post iom da silento, li plej serioze kiel eble pridemandas :

“ Karulino mia, ĉu vi ne opinias, ke ni devus aĉeti novan biciklon por la etulo ? ”.



Iu antikvajisto vizitas farmobienon kaj rimarkas dikan katon, langtrinkanta lakton el pelveto, kiun li tuj identigas ! Ĝi certe originas el romia epoko... Jam diskrete salivante, li alparolas la farmiston :

« Mia edzino jam de longtempe deziras katon... Se vi deziras eventuale liberiĝi je ĝi, ĝin mi aĉetas.

- Hem, kial ne ! Se vi konsentas pri ducent €, la ĉarma besto apartenas al vi !

- Senprobleme, tiun prezon valoras via kato ! »

La antikvajisto foriras, subite haltas, retrovenas ĝis la farmisto...

« Nu, tiamaniere ke mia kato ne tro suferu pro ŝanĝiĝo de ĉirkaŭaĵo, permesu ke mi kunprenu sian kutiman telereton !

- Absolute ne, neplenuminda deziro ! Tiu pelveto jam ebligis al mi vendi dek katojn dum la ses pasintaj monatoj ! ».



En Zoo, babilas du ĉimpazinoj, kiuj elvokas siajn etulojn.

“Ĉi-tie, en la besto-ĝardeno, ĉio perfektas, krom la merkredon, tago sen lernotempo.

Preterpasas multaj homidoj, kiuj petolas kaj daŭre grimacas antaŭ niaj kaĝoj ! La tmorgaŭon, niaj propraj infanoj iĝas ege neelneblaj ! ”.



Okazas gravaj laboroj sur la interna korto de hospitalo. Memkompreneble estiĝas diversaj bruoj, ofte intensaj...

Iu flegistino malfermas ĉambrofenestron, kaj alvokas teknikiston, kiu manovras pikmartelon :

“ Ĉu ne eblas mildigi tiun vibrigbruaĉon, mi petas ? ”.

Scivole pridemandas la fakulo :

“ Ĉu eventuale temas pri operacio en malfermita koro ?

- Ne, sed alvenis la momento, je kiu mi devas ŝovi termometron !... ”.

Profesoro en universitato prelegas en la amfiteatro...

Li okulumas al studentino, riproĉante...

“ Fraŭlino, vi ne aŭskultas min !

- Vi eraras, estimata Profesoro, vin mi aŭskultas !

- Nu, vi certe mensogas.. Mi plurfoje konstatis, ke vi oscedas !

- Vidu ... Jen la pruvo, ke mi aŭskultas vin ! ».



Du amikinoj babilas ...

« Ĉu vi ricevis respondon je via anonco, en kiu vi esprimis deziron malkovri edzon ?

- Jes ! Pluraj vrinioj jam reagis ...

- Virinoj ? Sed... kion ili proponis ?

- Forprenu la mian ! ».

En lernejo, la geknaboj pozas, cele kapton de la jarfina foto. La instruistino instigas ilin aĉeti la memorigan bildon.

“ Malfrue, tre malfrue, vi ĝojos okulumi al ĝi, montrante vizaĝojn al viaj propraj infanoj... Vidu, ĉi-tie staras Ludoviko, ne tro obeema ! Hodiaŭ li estas kuracisto ! Apud li, jen Ingrid, kiu estras gravan entreprenon. Malantaŭ ŝi oni facile rekonas Petron... Li migris al Aŭstralio, kiel ingeniero en informadiko ! ”.

Post iom da silento, aŭdiĝas eta voĉo en la klasĉambro:

“ Kaj starante maldekstre, jen nia instruistino, kiu forpasis jam de longtempe !

Ĉiuvespere la patro kutimas rakonti anekdoton al sia filo por akceli la ekdormon de la etulo.

Post duonhoro la patrino malfermas duone kaj senbrue la pordon de la ĉambro, en kiu regas mallumo...

Ŝi mallaŭte pridemandas :

« Ĉu li sukcesis ekdormi ?... ».

Aŭdiĝas infanvoĉo, kiu ankoraŭ pli mallaŭte informas :

« Jes, panjo ... finfine ! ».

« Sinjoro Pastro, paĉjo mia opinias, ke ni devenas de la simia gento !

- Karuleto, viaj familiaj aferoj ne interesas min ! »

distra angulo



Vertikala enigmo

- 1 + - - + - - - alkaolido
- 2 + - - + - - - ukraina havenurbo
- 3 + - - + - - - - - belkantata birdo
- 4 + - - + - - - tropika, herba ebenaĵo
- 5 + - - + - - - sveda fizikisto
- 6 + - - + - - - okulglob-membrano
- 7 + - - + - - - mekanismo por biciklo
- 8 + - - + - - - fridigeĝi produkton
- 9 + - - + - - - ideale plezuriga
- 10 + - - + - - - tro granda memŝato
- 11 + - - + - - - reao
- 12 + - - + - - - - - interkomunika sistemo
- 13 + - - + - - - punkta malapero de astro
- 14 + - - + - - - - - maŝino por rapide skribi
- 15 + - - + - - - eksciti la deziron
- 16 + - - + - - - haŭta afekcio
- 17 + - - + - - - bazo de kolono
- 18 + - - + - - - transversa plafontrabo
- 19 + - - + - - - - - teatra verko
- 20 + - - + - - - loĝanto de Samarkando
- 21 + - - + - - - grimpa planto
- 22 + - - + - - - kruela turmento
- 23 + - - + - - - ne prokrastigeble
- 24 + - - + - - - longa, ligna aŭ metala batalilo
- 25 + - - + - - - knabo sen gepatroj

Dank' al la vorteroj ĉi-sube alfabete ordigitaj, retrovu kaj lokigu la vorton trovitan laŭ la difino.

La unua kaj kvara kolumnoj vertikale legitaj proponos al vi humuran citaĵon de *Geluck*.

ak be cel co dio do ed ek ena eso fe fo fo ge ge go goj ĝe id in ino ir iso ka klo ko kon lan li li li lia lip lo lo lo naj nan neo no no no no od or or po ro sa sio so so so ste ter ten ti tin tor tra tu ur uz




HORIZONTALALE

1. Stirant'.
2. Mallongigo de grava Esperanta kunveno. Insulo en la Hinda Oceano.
3. Mallarĝa longa teksaĵ'.
4. Antikva regn' en U Azio. INVERSE: triangula ost'.
5. Flugistara membr'.
6. Malgaj'. Adverbo.
7. Ŝajniga atak' por trompi kontraŭulon. Ŝoseo sen vokaloj.
8. Dumfestena propon'. Sufikso.
9. INV: haŭta buton'. Kapŝirmilo.
10. Litera nomo. Mallarĝa pord' en fortikaĵo.
11. Mezepoka religia dram'.
12. Esprimi sentoj per gestoj. Pozicio de iu, kiu restas sur seĝo.
13. Ceremoniar' ĉe kortego. Inversa litera nomo.
14. Best'. Centre de arko.
15. Reĝo de Hunoj. Spec' de azia frakseno, kiu donas manaon.
16. Melankoli'.
17. Planlingv'. Flor' kun longbekaj fruktoj.
- 18 Malsupera rangulo en armeo.

VERTIKALE

- 1 Maŝin' produktanta elektron. Part' de la fiziko.
- 2 Optika lensar'. Grup' da personoj, kiu havas plenumantajn taskojn. Prepozicio.
- 3 Salivuminta. Agis same.
- 4 Aŭtoro de teatra verko. Fakulo pri scienco de la nekonsciaj fenomenoj de spirito.
- 5 INV: negu. Regnokodo de Gvatemalo. Loĝant' de norda Britio. Muzika teatr'.
- 6 Kunligi per fadenoj. Ĉef' de regno. INV: Kantmelodi'.
- 7 Enprenis fremdan teritorion. Vic'. Kalka arboforma skelet'.
- 8 Kunfiksata per metalaj pecoj. Saltinsekto. Bufo.
- 9 Litera nomo. Kaŝtan'. Vundi iun malrespektante

Krucvort-enigmo



Rebuso

unua bulo: *plo for de ne pri po tem go la ru flu la!*

dua bulo: *tin kan tio lo de gas la jn es !*

Solvo de la enigmo 157

« Edzino vivas pli longtempe ol la edzo, ĉefe kiam ŝi vidviniĝas ! »





stranga renkonto
en "La Petite Pierre" !



tro ardis la kongres-suno
por Monique kaj Bruno !



debato la komitato
dum la membro-kunveno en Stosswihr



gratulon al Ursula kaj Giuseppe GRATTAPGLIA
fondintoj kaj mecenatoj de « Bona Aero » !



Roman Dobrzynski « deĵoras » en Bona Aero !



Alloga program-sekvenco dum nia komuna, aŭtuna
staĝo-seminario en Ortenberg !
Nepre aliĝu por ĝui ĝin ! (vidu paĝojn 8 kaj 9)